# EKO 2021 Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-34 sendita el Budapeŝto la 17an de aŭgusto

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 76 kun ILEI: parto 2

Tio okazis en merkredo, la 11an de aŭgusto, kadre de la Kongreso de ILEI (VEKI 2). Jen la liverita programo:

**Hori Jasuo:** 'Esperanto Sumoo'. Tiu projekto strebas konvinki homojn legi pli da Eo-libroj. Partoprenantoj deklaras, kiom da paĝoj ili legu ĉiutage. Tial la sumoo-gajnantoj dependas je diligenteco kaj ne pezo. Fakte la leganto luktas kontraŭ si mem. La sumaj atingoj de la programo troveblas en Vikipedio kaj en la retejo
Esperanto-sumoo www.esperanto-sumoo.pl

**Bak Giwan**: Li prezentis la Esperanto-Muzeon en Zaozhuang Universitato, Ĉinio, per fotoj kaj tri-dimensiaj videoj. La muzeo establiĝis en 2013 kunlabore inter ĈEL, UEA, ILEI kaj Zaozhuang Universitato. Tie troviĝas Esperanto-Fako, kie nun studas 48 gestudentoj. La muzeo bezonas kunlaboron de ĉiuj esperantistoj en la mondo. Bonvole vizitu jenajn retejojn por ĝui videojn de la muzeo.

http://www.e-muzeo.com
http://720yun.com/t/c18jvzyavy8?scene_id=20208114
https://720yun.com/t/m4nm8pnpda12r26o0d?pano_id=BeV9nyB4p67DrXFO

**Martina Kvarantan Šmitran:** 'Per scivolemo al kapableco'. Ŝi atentigis, ke la homo laŭ de sia frua infanaĝo montras la inklinon al scivolo. Scivola infano dum la vivo estos pli sukcesa. Tamen, la eniro en la institucia edukado (lernejo) kun siaj reguloj iel deziras silentigi la scivolon. La sciemo aŭ scivolemo estas tre kreiva stato, kiu instigas nin fari demandojn en la estanta situacio. Demandoj donas al ni informojn (rimedojn), kiujn ni ĝis tiam ne havis aŭ ne rimarkis, kaj tio helpas al ni decidi ĝuste reagi en la koncerna situacio.

**Pawel Fischer-Kotowski: '**Pri Eo bibliotekoj'. Li kiel profesia bibliotekisto povis tre kapable skizi la obstaklojn kaj bezonojn de bone funkcianta kaj alirebla biblioteko. Longdaŭra celo estas la pli efika perreta kunordigo de la katalogoj de pliaj bibliotekoj.

**Aleks André:** 'Enkonduko de Esperanto en la lernejoj' ĉefe en Francio. Tiu prezentaĵo gamis de klasĉambraj spertoj ĝis rilatado kun edukinstancaj gravuloj, por

gajni kaj teni la rajtojn je instruado de Esperanto kaj aliri al ŝtataj ekzamenaj sistemoj, ekz. la bakalaŭro.




**Enrico Borello kaj Alessandro Simonini:** ‘Biblioteko de Massa kun atento al ĝiaj rilatoj kun ILEI’ Tiuj rilatoj klare centriĝas laŭ la personecoj de Mario kaj Catina Dazzini. Mario estis prezidanto de la Ligo, kaj Catina multjare ĝia sekretario. Ambaŭ estas honoraj membroj de la Ligo. La kolekto pliriĉiĝis en 2020, kun donacoj de Filippo Franceschi, plumnomo Sen Rodin, kaj de lia edzino, Julia Sigmund. Plie alvenis ĉirkaŭ mil libroj de la fermita Biblioteko “Glauco Corradi” en Milano al la ŝtate protektata muzeo en Massa.

Jen retejo, kiu prezentas la Eo-bibliotekojn tra Eŭropo, de kiu ni ĉerpis la interaktivan mapon. Vere, ĉi tiu retejo estas postsekvanto de la Jarlibra sekcio pri bibliotekoj, almenaŭ por Eŭropo. Restas la tasko kovri la tutan mondon.

https://bibliotekoj.org/esperantajbitoj/esperantistaj-bibliotekoj.html

**Mireille Grosjean:** ‘Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la mondo’ Tiu projekto liveras al multaj lernejoj en Svislando kaj aliaj landoj pretajn pakaĵojn da materialoj kaj rimedoj por ebligi al ajna instruisto – ne nepre esperantisto - prezenti unu lecionon pri la lingvo. La materialo dividiĝas al tri partoj. Unue venas enkonduka parto, kiu nomiĝas ‘krozado inter la lingvoj’; aldoniĝas kurseto pri la lingvo, kaj plie parto pri ĝia kultura fono kaj faktoj pri ĝi.

**Marija Belošević:** ‘Kontribuo al Eo-kulturo: traduke kaj sursceneje’. Ŝi atentigis pri la ricevintoj de la diplomoj pri Elstara Agado kaj Ekstera Arta Agado, inter kiuj troviĝas pluraj kiuj kontribuas al la E-kulturo de "nia epoko". Pro tio, la listo povus esti bona deipunkto por E-kulturo. Ŝi elstarigis la rolojn de tri elstaraj esperantistoj kiuj dum jardekoj donis grandegan kontribuon al E-kulturo: la profesia aktorino Vida Jerman (1939-2011), Antonio De Salvo (1942-2021) kreinto de la la informriĉa blogo "Esperanto vivo" (https://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo) kaj kroata tradukistino kaj verkistino Lucija Borčić (1921-2015).

Sekvis diskuto kaj demandoj antaŭ la fermo de la seminario.

## Reta edukado nun: Erasmus subtenas

Malfermiĝas en Đurđevac, Kroatio, EU, la unua ĉeesta kunsido de la Erasmus+ projekto "Reta Edukado Nun", fokusita pri la defioj pri edukado en la reta medio - aparte sed ne nur lige al la pandemiaj defioj. La nuna renkontiĝo traktos ankaŭ arkivadon kaj eldonadon, kaj kontribuos en ĝi pluraj fakuloj en la Esperanto-movado. La programo estas ĝuebla rete far ĉiuj interesitoj.

**2021/08/13 – sesio 1**
https://eventaservo.org/e/ren1
- Ana Manero: Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio
- Josip Pleadin: Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac

**2021/08/14 – sesio 2**
https://eventaservo.org/e/ren2

- Josip Pleadin: Bonvenigo
- Francesco Maurelli: Reta Edukado: defioj kaj oportunoj
- Josip Pleadin: grafikaj teknologioj kaj eldonado
- Ana Manero: Bitoteko, kadre de la servoj de la Biblioteko Juan Régulo Pérez
- László Szilvási: Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB)

**2021/08/14 – sesio 3**
https://eventaservo.org/e/ren3
- Przemysław Wierzbowski: Kompostado de rete uzeblaj materialoj
- Pascal Dubourg:  Esperanto-arkivoj, nuna stato kaj defioj

La projekto estas kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo (Pollando), kaj partoprenas Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio), Esperanto-KulturCentro Tuluzo (Francio), Bunta Esperanto-Asocio (Italio) kaj Kosmo Strategio ltd. (Britio).

Francesco Maurelli

## Kompletigo pri la afrika kontribuo al AMO 76

Pro mia eraro, en EKO 33 ne estis enprenita teksto liverita el nia redakcio pri la afrik-tema sesio de AMO 76. Mi pardonpetas. La teksto devis aperi:

> Podianoj estis Adjévi Adjé (Togolando) kaj Gilbert Ndihokubwayo (Burundo), kiuj detale klarigis la situacion en Afriko. Aldonaj afrikaj kongresanoj kontribuis al tio. Ĉiuj partoprenantoj multon eksciis kaj komprenis.

Ĉiukaze kune kun komuniko aperis la elŝutabla aŭ spektebla filmo de la sesio.

SMG



Du instruistoj el Burundo: Gilbert Ndihokubwayo, Patrick Manirakiza, kiuj sukcese plenumis en decembro 2019 la programo de ILEI por instruista trejnado: EIT.

## EKO adiaŭas al fidela redaktoro kun granda danko

Dum la Kongreso de ILEI okazis elekto de nova estraro, pri kiu ni raportis en EKO 32. Delonge la prezidinto de ILEI, Mirejo Grosjean, anoncis sian intencon ne plu kandidatiĝi post vigla okjara prezidado de la Ligo. Nun ŝi anoncis deziron rezigni el la kunredaktado de la EKO-komunikoj. Mi bedaŭras, sed bone komprenas la deziron

retiriĝi kaj emeritiĝi el tiom ampleksa engaĝigo de nia movado. Unu lastan fojon aperos en nia elektronika kolofono ŝia nomo kaj foto.

En la sekva EKO, ni aperigos alvokon por nova kunredakciano, kiu devas bone koni la agadojn kaj de UEA kaj de ILEI kaj la vivon de la Movado.




Supre: Sud-Afrika studgrupo pozas antaŭ ekspozicio

Dekstre: infanoj ricevas studlibretojn en la urbo Njiwa.probable en DR Kongo.

ilei

AFRIKO



========= vortoj:  790 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean





**ENHAVO**

- AMO 76 kun ILEI
- Bibliotekoj, klasĉambroj
- Muzeoj, ministrerioj
- Erasmus kaj dokumentoj
- Redakcia ŝanĝo